

„La morto de Stalin“ – ankoraŭ unu malpermesata filmo en Ruslando

Nova kulmino de la kontraŭ-okcidenta histerio en la kulturo de Ruslando



„La morto de Stalin“ (The Death of Stalin) estas brit-franca filmkomedio de la skota reĝisoro Armando Iannucci el la jaro 2017, kiu rakontas kun nigra humuro la okazaĵojn ĉirkaŭ la morto de la sovetia diktatoro Iosif Stalin en 1953 kaj la intrigojn okazintajn lige kun lia postsekvo. La filmo estis montrita unufoje okaze de la Internacia Kinofestivalo en Toronto (Kanado) en septembro 2017, poste en Britio en oktobro kaj en Germanio, Aŭstrio kaj Svislando en marto kaj aprilo 2018.

La filmo baziĝas sur la franca libro *La Mort de Staline. Une histoire vraie soviétique.* de la aŭtoroj Fabien Nury (komiksoj) kaj Thierry Robin (teksto) de 2010. Ĝi traktas la lukton por la potenco, kiu eksplodis en Sovetunio post la morto de Stalin en marto 1953 en la interna cirklo de la komunisma partio kaj sovetia ŝtato.

Enhavo: Post la disaŭdigo de iu Mozart-koncerto fare de Radio Moskvo Stalin postulas pertelefone registraĵon de tiu koncerto. Ĉar la koncerto ne estis registrita, la surbendigo devas esti hektike farita laŭ absurdaj metodoj. La pianistino Marija Judina (ludita de Olga Kurilenko), kies familianoj estis mortigitaj de la stalinsma reĝimo, rifuzas ripeti la koncerton, sed per alta monsumo oni sukcesas persvadi ŝin ludi duan fojon. En skatolo la disko estas sendita per kuriero al la daĉo de Stalin. En la skatolo troviĝas kaŝita mesaĝo de Judina por Stalin, kiu estas kulpigita, ke li kondukas la landon al la abismo. Kiam Stalin legas la noton, li komencas ridegi kaj samtempe estas trafita de infarkto en la cerbo, kiu paralizas kaj finfine mortigas lin. Neniu aŭdacas eniri la ĉambro de Stalin, kaj nur la venontan matenon oni trovas lin senkonscie kuŝanta sur la planko. La unua de la politburoo, kiu alkuras, estas Lavrentij Berija, la fifama ĉefo de la sovetia sekreta servo NKVD. Li trovas la mesaĝon de Judina kaj prenas ĝin por konservi ĝin ĉe ŝi. Baldaŭ aperos ankaŭ la aliaj membroj de la politburoo kiel Georgij Malenkov, al kiu Berija konsilas transpreni la gvidadon de la ŝtato kun la espero povi manipuli lin kiel marioneton.

Kun la escepto de Vjaĉeslav Molotov, kiu troviĝas sur listo de malamikoj de Stalin, ĉiuj aliaj membroj de la politburoo, inkluzive de Nikita Ĥruŝĉov, kolektiĝas en la daĉo ĉirkaŭ la mortonta Stalin. Ili forportas lin de la ĉambro kaj vokas medicinan helpon, kio ne estas facila afero, ĉar ĉiuj plej bonaj kuracistoj de Sovetunio estis arestitaj aŭ likviditaj. Finfine, iuj hazardaj kuracistoj povis esti trovitaj, sed ankaŭ ili ne plu povos helpi al Stalin.

Inter Ĥruŝĉov kaj Berija komenciĝas kaŝita lukto por la potenco. La ĉefo de NKVD ordonas interrompi la transportajn konektojn de kaj al Moskvo kaj taskas la sekretan servon okupiĝi pri la sekureco de la ĉefurbo anstataŭ la Ruĝa Armeo. Dum Molotov estas senkulpigita, Berija ordonas aresti novan serion de malplaĉaj personoj. Svetlana, filino de Stalin, kaj ŝia kolerema frato Vasilij alvenas en la daĉo, kie Ĥruŝĉov kaj Berija serĉas ilian favoron en la kredo gajni aldonan influon tra la infanoj de Stalin.

Kvar tagojn poste Stalin forpasas. La CK-anoj reveturas al Moskvo, dum agentoj de NKVD marodas la daĉon kaj likvidas atestantojn. Ĥruŝĉov serĉas Molotovon en lia loĝejo por gajni lin kiel aliancanon, kion li rifuzas, ĉar li volas eviti partian skismon. Ankaŭ Berija klopodas tiri Molotovon sur sian flankon, liberigante lian edzinon Polina el la prizono, ĉar antaŭe ŝi estis arestita de la NKVD.

Malenkov fariĝas nova formala estro de la sovetia registaro kaj Ĥruŝĉov ricevas la taskon prepari la funebran ceremonion por Stalin. Berija plibonigas sian publikan reputacion per amasa liberigo de politikaj malliberuloj kaj ĉesigo de reprezalioj kontraŭ la eklezio. Aliflanke eksplodas nova konflikto inter Berija kaj Georgij Ĵukov, milita heroo kaj ĉefo de parto de la Ruĝa Armeo, kiu estas ĉagrenita pro tio, ke NKVD akaparis la taskon de la sekurigo de Moskvo anstataŭ la armeo.

Kiam Berija ekscias, ke la pianistino Judina estas malproksima konatino de Ĥruŝĉov, ĉar ŝi instruis pianon al lia nevino, li minacas ambaŭ per iu mesaĝo sur la papereto, kiun li trovis ĉe Stalin. Sekve, Ĥruŝĉov renkontiĝas kun Ĵukov kaj interkonsentas kun li pri lanĉo de konspira puĉo kontraŭ Berija. Por saboti la laboron de Berija, Ĥruŝĉov ordonas repreni la trafikon al Moskvo. Agentoj de NKVD, kiuj gardas la ĉerkon de Stalin, rifuzas al la funebranta homamaso aliri la ĉerkon kaj komencas pafadi kontraŭ ĝi, pro kio mortas 1500 homoj. La politburoo proponas puni kelkajn funkciulojn de NKVD, kion Berija rifuzas, ĉar li timas, ke la puno povus trafi lin mem. Kolere li minacas la membrojn de la CK per kompromitaj informoj, kiujn li kolektis pri ili. Nun ankaŭ Molotov konsentas puĉi kontraŭ Berija, kondiĉe ke la CK-anoj konsentas, inkluzive de Malenkov. En la tago de la entombigo de Stalin la Ruĝa Armeo atakas la ĉeestantajn NKVD-agentojn kaj Berija estas arestita. Li estas akuzita pro ŝtatperfido, kondamnita al morto kaj ekzekutita en la korto, kie li estas ankaŭ cindrigita.

La filmo finiĝas per sceno, kiu montras Ĥruŝĉovon, kiu intertempe fariĝis nova gvidanto de Sovetunio, dum koncerto de Marija Judina. Dorse sidas Leonid Breĵnev, kiu forpuĉos lin dek unu jarojn pli poste.

La laboro de la produktado komenciĝis en majo ĝis junio 2016 en Londono. Kiel kulisoj estis utiligitaj Blythe House kaj Alexandra Palace. En Kievo oni uzis iun domon sur la strato Oles Gonĉar, la Urba Konsilio servis kiel konstruaĵo de NKVD kaj la Nacia Ekspocentro de Ukrainio kiel rezidejo de la Domo de la Sindikatoj. La 11an de aŭgusto 2017 pretis la reklama antaŭfilmeto (trejlero), kies rusa versio aperis la 7an de novembro. Dum la preparado de la filmo la aŭtoroj veturis al Moskvo, kie ili vizitis la Kremlo kaj la iaman daĉon de Stalin, parolis kun historiistoj kaj kun moskvanoj, kiuj ankoraŭ spertis la 50aj jarojn, kaj spektis kelkajn rusajn filmojn el la jaroj 1994 kaj 1998.

Kritiko

Kvankam la filmo ricevis grandparte pozitivan pritakson kaj plurajn premiojn, iuj kritikistoj tamen opiniis, ke ĝi donis tro malgrandan atenton al la viktimoj de la stalinisma teroro. Laŭdon trovis precipe la ironieco malgraŭ la teruro kaj hororo de la rakonto, kaj antaŭ ĉio la laboro de la usonaj kaj britaj aktoroj, kiuj vere brile plenumis sian rolon. Alia kritiko koncernis la aŭtentikecon de kelkaj historiaj detaloj, ekzemple la jura proceso kaj ekzekuto de Berija.

Filmoj pri temoj de la rusa historio, kiuj estas produktitaj en Okcidento aŭ kun okcidentaj partneroj, kutime provokas negativan reagon en Ruslando. Tiel, negativan kritikon trafis la filmojn „Blokado de Leningrado“ (2007)¹, „Matilda“ de Aleksej Uĉitel (2017)² kaj „Ruĝa pasero“ (2018)³.

La rusa kritiko de la filmo „Morto de Stalin“ ne estis pli favora kaj laŭ sia speco similis al la kritiko de „Matilda“, sed ĉifoje ne estis la rusa caro, kiu estis „misfamigita“ el la vidpunkto de rusaj caristoj, ekleziuloj, konservativaj politikistoj kaj historiistoj, sed Stalin, kiu vekis la koleron de protektantoj de la komunisma gvidanto. La fimkritikisto de *Rossijskaja gazeta*, Valerij Kiĉin, almenaŭ notis, ke la ĝenro de la filmo „Morto de Stalin“ estas difinebla kiel „kruda sed bedaŭrinde justa tragika farso“ kaj aldonis, ke la konscio pri tio, ke en la bazo de la grotesko troviĝas la dura vero, postlasas „senton de ŝoko kaj malforto“.

¹ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Attack_on_Leningrad.

² Vd. <http://www.plansprachen.ch/Matilda.pdf>.

³ Vd. <http://www.interfax.ru/culture/614950>.

Polemiko kaj malpermeso en Ruslando

En Ruslando la premiero de la filmo estis planata por la 25a de januaro 2018 en la moskva kinejo „Pioniro“, senkonsidere al la fakto, ke la licenco de la Ministerio de la kulturo de Ruslando por distribui la filmon estis reprenita la 23an de januaro, kvankam la 17an de januaro la sama ministerio doni la permeson prezenti la filmon.

Postuloj eviti kaj malpermesi la filmon venis en Ruslando de diversaj flankoj. En tio plej skurilaj figuroj utiligis plej absurdajn argumentojn.

Estis ĉefe la ruslandaj komunistoj, kiuj unue reagis negative al la filmo. Nikolaj Starikov, reprezentanto de KPRF kaj fondinto de la ruslanda politika „Partio Granda Patrujo“, nomis la filmon „malamika akto flanke de la brita klaso de inteligentuloj“ kaj elemento de la „kontraŭruslanda informa milito“, kiu celas la misfamigon de tia „ŝtatestro kaj granda gvidanto“ kiel Stalin. La sekretario de la CK de KPRF, Sergej Obuĥov, aldonis siavice, ke la filmo estas „nova laŭvica kazo de la psikologia milito kontraŭ nia lando“. La estro de la gazetara servo de KPRF, Aleksandr Juŝĉenko, esprimis la esperon, ke la rusa Ministerio de la kulturo ne permesos la distribuadon de la filmo al la kinejoj de Ruslando. Pavel Poĵigajlo, eksa vicministro pri kulturo de Ruslando (2006-8), eksekstro kaj reala membro de la Publika Konsilio ĉe la Ministerio de la kulturo, avertis, ke la filmo „La morto de Stalin“ efikas al la komunistoj same kiel la filmo „Matilda“ efikis al la ortodoksuloj, nomante ilin parto de „planata provoko“.

Post prezento de la filmo „La morto de Stalin“ je la 22a de januaro 2018 fare de la Ministerio de la kulturo de Ruslando en Moskvo, en kiu partoprenis diversaj aktivuloj de la kino, deputitoj de la Ŝtata Dumao, reprezentantoj de la Ruslanda Historia Societo kaj membroj de la Publika Konsilio ĉe la Ministerio de la kulturo de Ruslando (inter kiuj troviĝis la reĝisoroj Nikita Miĥalkov kaj Sergej Miroŝniĉenko, la filmproduktisto Leonid Vereŝĉagin, la vicprezidanto de la Publika Konsilio ĉe la Ministerio de la kulturo de Ruslando Elena Drapeko kaj aliaj), estis verkita publika letero al la ministro pri kulturo de Ruslando, Vladimir Medinskij, kun la peto dume repreni la licencon por la distribuado de la filmo en Ruslando. Inter la subskribintoj troviĝis nomoj kiel Nikita Miĥalkov, Vladimir Bortko, Sergej Miroŝniĉenko, Aleksandr Galibin, Era Ĵukova (filino de Georgij Ĵukov) kaj aliaj. La aŭtoroj de la letero vidis en la reklama antaŭfilmeto „ofendan rilaton al la ŝtata himno de la lando“ kaj pritaksis la filmon entute „verko kun tre malbone ludantaj aktoroj kaj kun neglektaj kaj malveraj dekoracioj“. Ili konsideris la strion „paskvilo (pamfleto) pri la historio de nia lando kaj opiniis, ke la enhavo de la filmo „povas esti taksita kiel ekstremisma kun la celo humiligi la dignon de la ruslanda (sovetia) homo“. Ĝian aperon sojle de la 75a datreveno de la memoro pri la Stalingrada Batalo ili konsideris „kraĉo kontraŭ la vizaĝo de ĝiaj viktimoj kaj ĉiuj ankoraŭ vivantaj homoj“. Ili petis la ministron fari juran ekspertizon pri tiu „malica kaj absolute maladekvata komedio“ kaj dume nuligi la licencon por ĝia distribuado. Ankaŭ la verkisto Jurij Polĵakov, ĉefo de la Publika Konsilio ĉe la Ministerio de kulturo, diris, ke la filmo estas „ekzemplo de la ideologia batalo kun nia lando“. La supre jam citita Pavel Poĵigajlo trovis en la filmo eĉ ofendon de la veteranoj de la Granda Patrolanda Milito kaj de la historiaj figuroj kaj misfamigon de la ŝtataj simboloj (t.e. de la sovetia himno, de ordenoj kaj medaloj). Oni opiniis, ke kelkaj scenoj estis tro perfortaj.

Estas rimarkinde, ke neniu komentanto emis serioze okupiĝi pri la ĉefaj protagonistoj de la stalinisma tempo – Malenkov, Vorosilov, Ĥruŝĉov, Kaganoviĉ, Molotov, Mikoĵan – kiuj aŭ aktive partoprenis la organizadon de la stalinisma teroro de la 30aj jaroj kontraŭ kulakoj, „popolaj malamkoj“, partiaj membroj, polaj civitanoj, k.m.a. aŭ portis gravan respondecon por tiuj krimoj, kun milionoj da viktimoj.

Krom tio, la filmo estis komentita ankaŭ de parencoj de Stalin, Ĥruŝĉov kaj Ĵukov. Jakov Dĵugaŝvili, kartvela artisto kaj socia aktivulo, pranepo de Stalin, komunikis en intervjuo kun la radiostacio „Moskva parolas“, ke li mem ne spektis la filmon, sed por li sufiĉas jam la difino de la ĝenro de la filmo kiel komedio, kaj nomis la aŭtorojn, por kiuj la „morto signifas kialon por ridado“, „malhomoj“ (ruslingve: neljudi). Sergej Ĥruŝĉov, la filo de Nikita Ĥruŝĉov, diris, ke la filmo estas perfekta ekzemplo de la distordo de la historio de Sovetunio kaj Ruslando, ĉar „en la konscion de la juna generacio oni enplantas mensogan, torditan kaj humiligan imagon pri la pasinteco kaj sekve ankaŭ pri la nuntempo de nia lando, kio signifas grandan danĝeron“. Ankaŭ li parolis pri „paskvilo kontraŭ la tuta popolo kaj la gvidantaro de la lando de la tiama tempo“. En la nomo de sia familio li petis la Ministerion de la kulturo

de Ruslando „klopodi por ke tiu malica mensogo ne venenu la sentojn de la junaj homoj, kiuj venis en la kinejon, kaj de tiuj, kiuj ankoraŭ konservis freŝan memoron pri la pasinteco“. Era Ĵukova, filino de Georgij Ĵukov, apartenis, kiel notite, al la subskribintoj de la supre menciita publika letero al la ministro pri kulturo de Ruslando, en kiu oni petis malpermesi la licencon por la distribuado de la filmo en rusaj kinejoj.

Post kiam la ministro pri kulturo Vladimir Medinskij konsideris la opiniojn de la civitanoj, kiuj atingis lin, li konkludis, ke la spektantoj perceptos la filmon kiel „ofendan mokajon pri la tuta sovetia pasinteco“ kaj decidis, la 23an de januaro 2018, ke la rajto disponigi la filmon al la kinejoj de Ruslando por publika prezentado estas nuligita. Samtempe li anoncis la okazigon de aldona jura ekspertizo. Laŭ rusaj reguloj, la rajto doni la permeson montri filmon povas esti nuligita, se ĝi enhavas informojn, „kies disvastigo estas malpermesataj laŭ la leĝo“. En tia kazo la posedanto de tia rajto devas redoni ĝin ene de 30 tagoj. La Kremlo elpuŝis tra sia parolisto Dmitrij Peskov la komunikon, ke oni ne estas informita pri la filmo, sed fidus al la „kompetenteco de la ekspertoj“ de Ministerio de la kulturo.

Kiel dirite, la 25an de januaro la filmo estis prezentita en la moskva kinejo „Pioniro“, kiu apartenas al la komercisto Aleksandr Mamut. La Ministerio de la kulturo anoncis, ke ĝi intencas kontroli la komunikon de la gazetaro pri tio, ke la filmo estis montrita en tiu kinejo sen rajto, kaj se la fakto povos esti konfirmita, estos enkondukita administra punproceso pro lezo de la leĝo. La 26an de januaro la koncerna kinejo komunikis, ke la prezentado de la filmo estos haltigita ekde la 27a tago de tiu ĉi monato. En la kinejo okazis entute kvar prezentoj. Julij Taj, la advokato de la kinejo „Pioniro“, rimarkigis, ke en la protokoloj de la Ministerio de la kulturo ne ekzistas pruvo, ke la prezentoj de la filmo „Morto de Stalin“ okazis en tiu kinejo, kaj klarigis, ke la ministerio mem ne kontrolis tiun ĉi fakton, sed baziĝis je artikolo de la gazeto *Izvestija*. Sed kiucele Taj faris tiun strangan komunikon ?

La plimulto de la ruslandanoj deziras vidi la filmon

Laŭ sociologia enketo okazigita de la Instituto VCIOM en februaro 2018, 30% de la demanditaj ruslandanoj subtenis la decidon de la Ministerio de la kulturo malpermesi la filmon „La morto de Stalin“ en ruslandaj kinejoj, dum 35% ne apogis ĝin kaj 58% esprimis la deziron vidi tiun filmon.

La gazeto *Vedomosti* konstatis, ke ĝia malpermeso kondukis al granda konateco de la filmo „La morto de Stalin“ en la lando. Kompare kun la filmo „Matilda“ evidentiĝis, ke la „malhonorigo“ de Stalin estas por rusoj pli interesa afero ol tiu de la caro. La komentanto Andrej Arĥangelskij, unu el la plej brilaj intelektuloj de Ruslando, skribis en *Ogonjok*, ke li opinias, ke „sub la aktualaj kondiĉoj estas paradokse, ke le komedia ĝenro“, la „absurda komedio“, „kapablas pli bone respeguli la seriozecon kaj sinistran aktualecon de la traktitaj eventoj okazintaj antaŭ tom da jaroj“ kaj „la frenezan etoson“, kvankam Stalin „tute ne estas kialo pro ridi, ol ĉiuj ceteraj Stalin-filmoj, kiuj havas „vole-nevole nur unu taskon: pravigi kaj gloradi la perforton“ kaj estas nur „tedaj, banalaj kaj seninteresaj provoj“ trakti tiun periodon, kiuj kontentigas nur stalinistojn. Laŭ Arĥangelskij, „la rilato al Stalin estas en Ruslando hodiaŭ la rilato al la stata perfort“.

En aliaj landoj de la postsovetia spaco la filmo estis traktata diversamaniere: En Belorusio ĝi estis permesita nur post ekzamenado de la enhavo fare de la Ministerio de la kulturo. Fine de januaro kaj komence de februaro 2018 premieroj de la filmo okazis en iuj kinejoj de Armenio, Kazaĥstano kaj Ukrainio, dum en Azerbajĝano la filmo estis malpermesita de la tiea Ministerio de la kulturo.

Post „Matilda“ ĉi tiu nova filmo „La morto de Stalin“ estas plej freŝa kaj embarasa ekzemplo por la ridinda, hipokrita kaj paranoja sinteno de la politikaj oficialuloj en la kulturo de Ruslando, kiuj baziĝas sur la opinio de iuj „gravaj“ kulturaj aktivuloj (kiel la pranepo de Stalin) kaj de supozata plimulto de la popolo, kies kontraŭ-okcidenta histerio estas evidenta kaj atingis novan kulminon de la idioteco kaj primitiveco. Kiel la statistiko de VCIOM evidentiĝis, la plimulto de la homoj en Ruslando ŝatus tamen vidi la filmon, sed tion ne povas fari pro la obstina kaj rigida kontraŭstaro de malgranda konservativa kaj izolita reakcia grupo ĉirkaŭ la Kremlo, kiu kondukas en morala vidpunkto eĉ pli papece ol la papo mem. Verŝajne ili timas publikajn protestojn kaj tumultojn en Ruslando, kiuj povus ne nur perturbi la ĝeneralan tombejan trankvilon (krom orkestritaj militaj, sportaj kaj patriotismaj aktivecoj), kiu regas en tiu lando, sed ankaŭ serioze direkti sin kontraŭ la reganta klaso, kiu rigore kontrolas la landon kiel en orienta diktaturo (kia ankaŭ Sovetunio estis). Anstataŭ konfesi tiun veron, oni preferas,

laŭ tipe rusa maniero, agresi eksterlandan artfilmon, kiu estis majstre verkita. La malpermeso de la filmo „Morto de Stalin“ ilustras denove, en kiu sinistra kaj malmatura politika situacio la kulturo de Ruslando troviĝas. Restas do nur esperi, ke la racio kaj libereco revenos en la kulturon de Ruslando kaj ke la konservativaj reakciuloj, kiuj malhelpas ĝian progreson, baldaŭ malaperos de la sceno, aŭ teatro.

Certe, en Ruslando oni produktas proprajn Stalin-filmojn. Tiel, en 2013 aperis la filmo „Mortigi Stalinon“ kiel serio de la ruslanda kaj ukraina (!) televido. Ĝia reĝisoro estis Sergej Ginsburg, kiu mem ludis iun rolon en la filmo. Tiuspeca filmo, farita laŭ sovetia maniero, ŝajnas pli konformi al la gusto de la publiko en Ruslando kaj Ukrainio, kiu kutimas konsumi sovetitipajn militfilmojn anstataŭ okcidentaj satiraj komedioj pri serioza historio temo. Ĝuste pro tio kritikistoj kiel Andrej Arĥangelskij konkludas, ke spekti la filmon „La morto de Stalin“ de Iannucci estas utile, ankaŭ pro artaj kialoj, ĉar la farmaniero de tia filmo akre diferencas de la maniero kiel filmoj estas produktitaj en Ruslando.

Bonan novaĵon pri „La morto de Stalin“ oni ricevis en Ruslando malgraŭ polemiko kaj malpermesoj: la libro de Fabien Nury kaj Thierry Robin aperos en Ruslando en la eldonejo Eksmo-AST en la rusa lingvo. Ne malgranda konsolo por popolo, kiu devas elteni tiom multajn – kaj finfine ridindajn, sensencajn kaj neakcepteblajn – ŝtatajn malpermesojn kaj ĉikanojn!

Andreas Künzli, junio 2018

Uzitaj fontoj:

https://de.wikipedia.org/wiki/The_Death_of_Stalin kaj ĝia rusa versio.

https://www.mkrf.ru/press/news/deyateli_kultury_i_politiki_obratilis_v_minkultury_s_prosboy_provesti_ekspert_izu_filma_smert_stalina

<http://tass.ru/kultura/4899919>

<https://govoritmoskva.ru/news/148722>

<https://www.kommersant.ru/doc/3520884>

<https://www.theguardian.com/world/2017/oct/14/in-russia-nobodys-laughing-at-armando-iannucci-death-of-stalin>

https://en.wikipedia.org/wiki/Armando_Iannucci

https://fr.wikipedia.org/wiki/Fabien_Nury

[https://fr.wikipedia.org/wiki/Thierry_Robin_\(auteur\)](https://fr.wikipedia.org/wiki/Thierry_Robin_(auteur))

https://en.wikipedia.org/wiki/Olga_Kurylenko

<https://www.exlibris.ch/de/buecher-buch/english-books/fabien-nury/the-death-of-stalin/id/9781785863400>

<https://www.exlibris.ch/de/filme/bd-blu-ray/simon-russell-beale-jeffrey-tambor/the-death-of-stalin-blu-ray/id/7613059320536>

<https://www.apollo.ee/stalini-surm-dvd.html>

<https://www.kinopoisk.ru/film/972919>

<https://knife.media/la-mort-de-staline>

http://cyclowiki.org/wiki/Убить_Сталина

http://cyclowiki.org/wiki/Убить_Сталина

<https://www.youtube.com/watch?v=rdBHhYicTGs>

© www.planlingvoj.ch / www.zamenhof.ch, junio 2018

La (svisa) aŭtoro, nask. en 1962, studis slavistikon, orienteŭropan historion kaj internacian juron en la Zurika universitato. La studojn li finis en 1992 per licencia verkaĵo pri la historio de Esperanto kaj interlingvistiko en Ruslando kaj Sovetunio kaj estis diplomita per la titolo lic. phil. (M.A.). Esperantisto de 1979. Retestro de www.osteuropa.ch (ankaŭ: www.balkan.ch kaj www.slavistik.ch).